# Novaĵoj Tamtamas


**Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)** エスペラントよこはまのエスペラント文会報


# Ricevotaj lernolibroj!

Al nia Projekto Lernolibro, venis ĝis nun jenaj respondoj, ke ni ricevos lernolibron de jenaj personoj. Kelkaj el ili proponas transdoni la libron okaze de la UK en Slovakio. En la suba listo, la lingvo de la lernolibro estas menciita.

1) Mirejo Grosjean (Svislando): kredeble franclingva
2) Bardhyl Selimi (Albanio); albanlingva
3) Stano Marček (Slovakio); slovaklingva kaj aliaj
4) José Antonio Vergara (Ĉilio); hispanlingva
5) Lee Jungkee (Koreio); korelingva
6) Elena Nadikova (Rusio); ruslingva kaj ĉuvasa
7) Joel Muhire (DR-Kongo); franclingva kaj svahila
8) Mallely Martínez (Meksikio); hispanlingva
9) Petr Chrdle (Ĉeĥio); ĉeĥlingva
10) Probal Dasgupta (Barato); bengallingva (jam ricevita)
11) Altan Ceceg (Mongolio); mongollingva

**Jen estas foto de Joel Muhire.**
(7 en la maldekstro)




Mi amas Esperanton.

**El Reeĥoj**

Venas reeĥoj al nia alvoko pri la Projekto Lernolibro. Jen unu el ili el Koreio.

> Kara s-ino Doi Ĉieko,
> Kun ĝojo mi legis vian leteron.
> Antaŭ ĉio mi sendas aplaŭdon por via nova iniciato.
> [...]
> Amike via, Lee Jungkee (Koreio)

## Niaj Klasoj kaj Kursoj

Okazas jenaj klasoj (ĝenerale en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa)
*Regulaj Klasoj en sabato:
(1) Klaso Esenco por legi "Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia"/(2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: "Vizaĝoj" / (3) Daŭriga kurso 2, lernado per "Hanako"/ (4) Daŭriga kurso 1, tagoj nefiksitaj, lernado per "Hanako"
*Regulaj Klasoj en merkredo:
(1) Oni legas "La Zamenhof-Strato" de Roman Dobrzyński / (2) Daŭriga kurso: legata libro estas "Barbro kaj Eriko".


Esperanto Jokohama

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas Esperanto Jokohama: Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nisisiba 4-17-9, Kanazawaku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-236-0017)
■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## Socio Jokohama

# Kun infanoj vizitu bibliotekon !

Doi Ĉieko

En Jokohamo estas 18 publikaj bibliotekoj, el kiuj nun estas 9, kiuj havas spacon por infanoj. Homoj kun infanetoj povas viziti tiujn bibliotekojn.

Ekzemple estas Centra Biblioteko de Jokohamo, proksime de la zoologia ĝardeno. Ĝi estis fondita en 1994. En la unua etaĝo estas spaco por infanoj, nomata "Angulo, kie infanetoj unuafoje renkontas libron". En la spaco estas ankaŭ libroj pri kuirartoj, manlaboroj ktp. Senĝene junaj patrinoj povas elekti librojn. Proksime estas ankaŭ spaco por ŝanĝi vindaĵon de bebo, kaj ankaŭ por mamnutradi. Oni aranĝas legadon de rakontoj al infanoj du-tri fojojn monate. Patrinoj amikiĝas inter si. Okazas ankaŭ konsiloj fare de bibliotekisto por rekomendi indajn infanlibrojn.

En alia biblioteko volontuloj prizorgas legad-rakontadon.

Estas ankaŭ biblioteko, kie oni metas ses rekomendindajn librojn en unu sakon, kaj tiel oni povas facile pruntepreni la sakon da libroj por infanoj.

(subaj fotoj estas la Centra Biblioteko de Jokohamo, el hejmpaĝo)





## Beletro

# Triangulo kaj kvarangulo（三角と四角）

verkita de Iwaya Sazanami
tradukita de Sibayama Noriko

Matematiko enhavas tiel nomatan geometrion. Por lerni geometrion oni nepre bezonas rektilon. Inter tiuj rektiloj troviĝas triangula rektilo, kiun vi ĉiuj kredeble scias.

La Triangula Rektilo estis ege fiera, ke ĝi havas tri pintajn angulojn sur sia korpo. *En la mondo multaj aĵoj ekzistas, sed neniu havas pli multajn angulojn ol mi. Koncerne nombron de anguloj mi estas la unua.* Tiel ĝi arogante fieris pri siaj nur tri anguloj.

En iu tago venis Krajono, kiu kuŝis sur la sama tablo, kaj diris,

**Krajono** – *Kara Triangulo, vi ĉiam ege memlaŭdas la angulojn, kaj ni ankaŭ kredis, ke neniu superas vin pri la nombro de anguloj, tamen ĉu vi vidis la Desegnotabulon venintan lastatempe? Ĝi havas pli multe da anguloj ol vi.*

Triangula Rektilo diris kun malkontenta mieno,

**Triangulo** – *Ĉu estas ulo kun pli multe da anguloj ol mi? Ne blagu. Eĉ kiom vasta la mondo estas, neniu povas havi pli multajn angulojn ol mi.*

**Krajono** – *Tamen ja povas esti sendube.*

**Triangulo** – *Kio? Viaj okuloj estas fuŝaj.*

**Krajono** – *Tute ne. Se vi dubas pri mi, iru kaj vi mem vidu ĝin!*

**Triangulo** – *Tiom vi insistas, do mi provos. Se vi mensogas, mi ne pardonos vin.*

**Krajono** – *Bone mi vetos eĉ mian vivon.*

Ili kune iris por vidi, do certe la Desegnotabulo estis ja kvarangula kaj havis unu angulon pli multe ol Triangula Rektilo. Plie ĉiuj, kiuj laŭdis la Rektilon ĝis tiam, flatis la Tabulon laŭdante la angulojn.

**Krajono** – *Jen, mi ne mensogis, ĉu?*

**Triangulo** – *Vere, estas humiliga situacio...*

Ĉi tie eĉ la vanta Triangula Rektilo nur sentis honton sed nenion alian. Ĝi ege perdis sian honoron, sed en sia koro ne emis rekoni sian malvenkon. *Fi, aroganta Desegnotabulaĉo kun superflua angulo ĝisfunde hontigis min. Atendu mian repagon.* Finfine ĝi ekhavis malbonan ideon pro troa bedaŭro.

Reveninte ĝi tuj iris al najbara Tondilo kaj diris,

**Triangulo** – *Kara Tondilo, mi hezitas diri al vi, sed ĉu vi ne permesus min disponi vian korpon dum tiu ĉi nokto?*

Tion aŭdinte Tondilo demandis,

**Tondilo** – *Hm, se la cirkonstancoj postulas, mi ne malpermesas min je via dispono. Kiun do vi tondos?*

**Triangulo** – *Mi intencas tondi iom malmolan aĵon, ĉu eblas?*

**Tondilo** – *Mi povas tondi preskaŭ ĉiun aĵon, sed se vi dubas, akrigu mian klingon, mi rekomendas.*

**Triangulo** – *Dankon, do laŭ via afabla propono mi akrigos vin. Akceptu mian kaprican peton eĉ malgraŭvole, kaj toleru doloron por iom da tempo, mi petas.*

Tiel dirinte Triangula Rektilo perfekte akrigis la Tondilon por ke tiu neniom fuŝu, kaj senpacience atendis la vesperiĝon.

Baldaŭ vesperiĝis, noktiĝis kaj kiam la tuta ĉirkaŭo dormis en silento, Triangula Rektilo singarde ellitiĝis kaj portante la Tondilon sub sia brako, ŝtelpaŝe alvenis al dormejo de la Desegnotabulo.

Ĉar la Desegnotabulo profunde dormadis kun brua ronkado komforte kaj senzorge, Triangula Rektilo ĝoje subridetis. *Malbenita*



*Desegnotabulaĉo, nun mi eltondos ĉiom el viaj anguloj, pro tio vi estos senangululo de morgaŭ. Vi ne plu povos fieri kaj pavi.* Kun tiom da senkompata klaĉo en koro, Triangula Rektilo subite eltondis unu angulon, sed la Desegnotabulo ankoraŭ ne rimarkis, do la Rektilo plue eltondis pli da angulo. Malgraŭ tio la Desegnotabulo ne vekiĝis, kaj la Rektilo plu tondis pli kaj pli da anguloj, dirante *Kiel dormema vi estas*. Finfine ĝi eltondis ĉiom el la kvar anguloj, kaj kontente reiris al sia loĝejo dankante al la Tondilo, kaj endormiĝis.

En la sekvanta mateno kiam la Triangula Rektilo ellitiĝis kun indiferenta mieno, ekstere ĉiu pasanto priparolis iun reputacion, *La Desegnotabulo estas brava.* Ĉar oni tiel ripete laŭdegas la Desegnotabulon, Triangula Rektilo iris por certigi kio okazis, kaj je ĝia miro, la Desegnotabulo, kiu estis kvarangula ĝis hieraŭ, impone marŝas kun ok anguloj ĉi-matene.

Eltondita kvar-angulo faras duoblan ok-angulon, tio estas natura, kaj tion faris Triangula Rektilo mem, sed ne rimarkinte la fakton, ĝi konsterniĝis.

*Hiiii! Kio okazis? La kvarangululaĉo fariĝis okangululo en unu nokto. Se la afero iros kiel ĝis nun, morgaŭ ĝi fariĝos dekangululo aŭ eĉ dudekangululo, mi jam ne povos venki ĝin.*

Finfine Triangula Rektilo akceptis sian malvenkon. Ĝi ja estis stultulo ne konanta sin mem. (fino)

**Pri la aŭtoro**

Iŭaja Sazanami（巌谷小波 1870~1933）
De la jaro 1891 li fariĝis fabelisto. Li ne nur verkis originalajn fabelojn, sed ankaŭ rerakontis malnovajn japanajn rakontojn en facila lingvo komprenebla al geknaboj.

## TIEL OKAZIS

**Ekskurso al Mooka kaj Masiko**

apr. 3, tuttage, en Gubernio Totigi

11 anoj (niaj rondanoj kaj alia) trajne kaj buse ekskursis al Mooka kaj Masiko. En Mooka estas la Memordomo de s-ro Kubo Sadaziro, esperantisto kaj beletra kritikisto. Post tagmanĝo tie, ni vizitis najbaran urbeton Masiko, fama pro fajencaĵoj. Fakte, dank' al gvido de parenco de nia rondano, fajenc-artisto, ni ĝuis la fajencaĵojn tie.

**Trideko da Esperantaj Libroj donacitaj**

Estas "Muzeo pri Moderna Literaturo de Gubernio Kanagawa" en nia urbo Jokohamo, kaj nia rondo estas ties subtenanto. En la komenco de aprilo, ni donacis al la muzeo ĉ. 30 librojn, nome Esperanten tradukitajn japanajn literaturaĵojn.

**Hama-Ronda Vespero en aprilo**

apr. 16, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

temo: Prezento pri Esperanto - laŭ maniero mia

Jenaj rondanoj, kiuj lastatempe prezentis Esperanton al la publiko, montris al ni per bildoj projekciitaj komputile, kiel kaj kion ili prezentis, kun mencio, kial ili agadas por Esperanto. 12 ĉeestis.

(1) s-ino Takahasi Kimiko, ĝenerale pri Esperanto, (2) s-ro Fuse Kentarou, (3) s-ino Miyazaki Hideko, (4) s-ro Nanba Fumiharu

**Rudimenta kurso**

Okazas la kurso de la 7a de majo ĝis la 16a de julio, ĉiusabate. Gvidas s-ro Iwaya Mituru. En la unua tago venis 2 kursanoj, kaj plia unu estas atendata.

## NIAJ PLANOJ

**Hama-Ronda Vespero en majo**

maj. 21, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

temo: **Artefaritaj lingvoj --- diference de Esperanto**

Esperanto estas lingvo ofte nomata "artefarita". Sed en la mondo estas multaj provoj, kies trajtoj tute diferencas de la esperanta trajto. El ili, prezentota estos Solresol, muzika lingvo de la 19-a jarcento, kaj logika lingvo lojban (prononco: loĵban), hodiaŭ uzata. Gaste prelegos unu el la lojban-istoj.

## Humuro

# Odesaj Anekdotoj

①

"Ĉu vi denove revenis el restoracio?"

"Ĉu vi deziras, ke mi tie noktumu?

②

"Kelnero, al mi ŝajnas, ke ĉi-fiŝo ne estas tiel freŝa kiel estis antaŭhieraŭa."

"Vi ne pravas, ĝi estas la sama fiŝo."

③

"Bonvolu voki direktoron de via restoracio, ĉar mi ne manĝos tiun kotleton!"

"Ankaŭ li ne manĝos ĝin."

④

"Hieraŭ mi vidis vin kun via edzino en la teatro."

"Mi petas vin ne diri pri tio al ŝi."

⑤

"Karulino, mi havas tre malbonan trajton de mia karaktero. Mi ofte ĵaluzas sen iu ajn okazo."

"Ne maltrankviliĝu, karulo, mi ĉion faros, ke vi havu tiun okazon."

⑥

"Bonvolu diri, ĉu vi ne rimarkis ie proksime policanon?"

"Ne."

"Tiam demetu la palton."

Ili estis prenitaj el broŝuro nomata "Kantoj pri Odeso kaj Anekdotoj", eldonita antaŭ 20 jaroj (en 1996). Odeso estas unu el la ĝemelaj urboj de Jokohamo kaj nia rondo havas amikan rilaton. Siatempe nia rondano, s-ro Tanigawa Hirosi akiris la broŝuron kaj konservadis. Nun ni represas kelkajn el ili. Dankon al Odesanoj!